

# REVUE

ESPERANTO

J. 19626/33  
(2970)  
**FRANÇAISE**

# D'ESPERANTO

## FRANCA ESPERANTISTO

Fondée en 1908 — 38<sup>e</sup> année — 3<sup>e</sup> série N° 262 — MARS - AVRIL 1970

1966-1967: 1445 membroj....

1967-1968: 1264 membroj....

1968-1969: 1124 membroj....

1969-1970: ???

Tiuj ciferoj reliefigantaj la persistan malkreskon de nia membraro atingis la estraron kaj min kiel vangofrapon, kaj nuligis la klopodojn de la estraro plivigli nian agadon malgraŭ gravaj atingajoj: sanigo de niaj financoj, plibonigo de la ĝenerala informado, ktp...

**AMARAJ  
PRIPENSOJ**

Sendube, multaj el vi estos ankaŭ ŝokitaj per tiu rezultato: mi volas paroli pri tiuj -ĉiam la samaj - kiuj malavare laboras(is) por siaj federacioj kaj por nia U.F.E., kaj kuraĝigis min per oftaj leteroj.

Sed ciferoj estas ciferoj.....

Miaflanke, mi eltiris la konsekvencon de tiu malsukceso, kaj logike lasos al nia membraro la zorgon trovi alian sekretarion. Mi alvokas la eternajn grumblulojn por ke ili prenu sian respondecon.

André BOURDEAUX  
=====

09/920/d

# FRANCA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE U.F.E. (Unuiĝo Franca por Esperanto)

34, rue de Chabrol, Paris X<sup>e</sup> - Tél. : 770-55-03

ABONNEMENT ANNUEL : 30 Francs. — Le Numéro : 3 Francs (CCP 855-35 PARIS)

Rédaction provisoire :

J.-A. ROUSSEAU

U.F.E., 34, rue de Chabrol

75-PARIS (10<sup>e</sup>)

—

Les textes à publier doivent être toujours dactylographiés avec double marge et double interligne.

—

Prière d'envoyer des clichés et non de simples photographies.

—

Les manuscrits non insérés ne sont pas renvoyés.

—

Joindre 0,80 F. en timbres pour tout changement d'adresse.

## FONDUSO

### ESPERANTO-DOMO

=====

Fr. MARMOU .... 12,65

Sro GOUDE ..... 18,50

Sro CANAT ..... 5,00

Fno LEMONNIER . 19,00

Anonimulino ... 88,00

Fr. MARMOU .... 17,50

Sro LEMAIRE ... 10,00

Anonimulino ... 100,00

l2a listo... 270,65

Antaŭa sumo 9.677,50

Nova sumo .. 9.948,15

=====

## Personnalités françaises

### patronnant l'action d'information sur l'Espéranto

L'information en faveur de l'usage de la langue internationale Esperanto dans le monde entier est soutenu en France par le patronage de hautes personnalités dans le Comité français d'information pour l'Espéranto, parmi lesquelles :

M. Alain POHER, président du Sénat, ancien Président du Parlement Européen.

M. Maurice GENEVOIX, de l'Académie Française ;

M. Jean ROSTAND, de l'Académie Française ;

M. Maurice FRECHET, de l'Académie des Sciences ;

M. Charles CAMICHEL, de l'Académie des Sciences ;

M. Georges AURIC, de l'Académie des Beaux-Arts ;

M. Jean CHARBONNEAU, de l'Académie des Sciences Coloniales ;

M. Pierre ESCOUBE, conseiller à la Cour des Comptes ;

M. Henri BAISSAS, inspecteur général de l'Education nationale ;

M. Paul MAUREILLE, Inspecteur Général de l'Education nationale ;

M. Maurice BAYEN, Recteur d'Académie ;

M. Emile DELAGE, Recteur d'Académie ;

M. Paul DOTTIN, Recteur d'Académie ;

M. Paul GERVAIS, Inspecteur Principal (Jeunesse et Sports) ;

M. LECLERC, Inspecteur (Enseignement 1<sup>er</sup> degré) ;

M. G. HERAUD, Professeur à la Faculté de Droit de Strasbourg ;

M. René COUTEAUX, Professeur (Faculté des Sciences) ;

M. André CAILLEUX, Professeur (Faculté des Sciences) ;

M. Marc EYROLLES, Président du Touring-Club de France ;

M. CHAREILLE, Président de la Chambre de Commerce des Métiers de la Creuse.

## S O M M A I R E - E N H A V O

=====

Editorial	25	Markola kongreso	34
Oficialaj komunikoj de UFE	27	62a Kongreso UFE	35
Kongresregularo	28	Kalendaro de la feder.kongresoj	35
Recenzoj	29	Echos de la Presse	36 k 38
Vivo de Grupoj	30	E°-Actualités	37
Pedagogia kongreso	32	Fervojista asocio	39
BAGHY en la Franca (Albault)	33	G.E.E.	40
Nacia konkurso	34	Karavano al Vieno	40

OFICIALIAJ KOMUNIKOJ DE U. F. E.

GRUPOJ kaj FEDERACIOJ

Société Espérantiste de LYON

Por la jaro 1970 la estraro de la societo estas jena:

Prezidantoj: F-ino CLAVIER, S-ino EYSSAUTIER, S-ro DAMIRON  
Sekretarioj: S-ro LEMAIRE kaj F-ino ARGENCE  
Organizado de Festo: S-ino EYSSAUTIER

Kasistinoj : F-ino GALLON, S-ino PRAL

Gejunuloj : Hervé GONIN kaj G. MILLAT

ÂCARENTE ESPERANTISTA ASOCIO

Nova estraro por la jaro 1970:

Prezidanto....: S-ro LAURENT (Ruelle)  
Sekretario....: S-ro JONQUET (Angoulême)  
Kasisto.....: S-ro BOUDOIRE (Soyaux)  
Bibliotekisto.: S-ro MARTINEZ (Angoulême)

Bulteno:

Redaktoro.....: S-ro BEJAR (Cognac)  
Administranto.: S-ro PAYRARD (Magnac)

PROPAGANDO

Estas ĉiam je via dispono, por via loka esperanto-propagando, celtrafaj afiŝoj en la formatoj 40x60 (10 ekz. 3,50 F.) kaj 30x40 (10 ekz. 3 F.) Sin turni al S-ro FRANGEUL 42 rue du Fré-rigeon (49) ANGERS por la mendoj, kaj pagi al Groupe Espérantiste Angevin CCP NANTES 29079.

KOTIZOJ

Ni denove atentigas la membrojn, ke la kotizoj devas esti pagataj al la kasistoj de la grupoj aŭ de la federacioj sed ne rekte al UFE. Por tio ni aperigis en RFE N°260 (nov/dec 1969) la liston de la kontoj de la kasistoj. De tiam tamen estas membroj kiuj daŭre sendas sian kotizon al Chebrol!

por U. F. E.

membre titulaire..... 30,00  
membre adhérent..... 6,00  
membre junior (- 21 ans) 15,00  
membre donateur..... 45,00  
membre bienfaiteur..... 75,00  
membre titulaire à vie.. 600,00  
membre donateur à vie... 900,00  
membre bienf. à vie.....1500,00

por U. E. A.

Membre-Jarlibro..... 23,00  
membre-jarlibro (-22 jara).. 11,50  
membre-abonanto..... 46,00  
membre-abonanto (-22 jara).. 34,50  
membre subtenanto ..... 69,00  
dumviva membro ..... 920,00

-o-o-o-o-

# KONGRESA REGULARO

-----

starigita de UFE-Konsilio en septembro 1969

---

## PRINCIPOJ -

1) La Nacia Kongreso estas manifestacio de la franca esperantistaro; ĝi celas fortiigi la solidarecon inter francaj gesamideanoj, progresigi la francan movadon kaj studi ĝiajn problemojn. Tamen iafoje tiu kongreso povas okazi en sama tempo kaj loko kun simila alinacia kongreso, aŭ kun la Universala Kongreso.

2) UFE, la Federaciaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj aliĝintaj al UFE prezentas raportojn al la kongreso. Krome, iu ajn asocio eĉ ne aliĝinta al UFE povas aliĝi al la kongresi, kaj prezenti raporton kun permeso de la UFE-Konsilio. Laŭ bezone la kongreso diskutas la raportojn kaj voĉdonas en formo de deziresprimoj, kiuj poste estas traktataj de la Konsilio. Ankaŭ la F.E.I. raportas pri sia aktiveco. Tamen, la jarkunveno de UFE laŭ la statuto diskutas kaj aprobas la propran asocian jarraporton, voĉ-donas, por elekto de la konsilianoj.

3) La konsilio de UFE starigas la kongresan regularon.

La Loka Kongresa Komitato (LKK) devas skribi aprobi la regularon en la momenta kiam ĝi proponas al la estraro de UFE inviti la kongreson.

4) Ordinare okazos Unu Nacia Kongreso en ĉiu jaro. La kongreso devas esti invitita de loka esperantistaro pere de ĝia grupo aŭ sekcio, kun konsento de la regiona federacio. Laŭ cirkonstancoj UFE povas mem organizi kongreson interkonsente kun lokaj esperantistoj aŭ alilandaj asocioj.

5) La Estraro de U.F.E. decidas pri loko kaj tempo de la Nacia Kongreso laŭ la esprimdeziroj de la antaŭa kongreso, preparas liston de la traktotaj temoj kaj difinas la laborplanon. La Prezidanto de UFE gvidas la laborkunsidojn, aŭ komisiis reprezentanton tiucele. La ĝenerala Sekretario de UFE estas la ĝenerala sekretario de la laborkunsidoj.

6) La Nacian Kongreson prezidas laŭ cirkonstancoj prezidantaron konsistanta el:

la Prezidanto kaj Vicprezidantoj de UFE  
la Prezidantoj kaj vicprezidantoj de la alinaciaj asocioj partoprenantaj,  
la Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato,  
la Prezidantoj de Esperantlingvaj Institutoj

## ORGANIZADO -

7) La kongreson organizas Loka Kongresa Komitato; ĝi estu elektita de la loka esperantistaro, kaj aprobita de U.F.E.

Laŭeble ĝi konsistu el:  
Prezidanto (ĝeneralaj aferoj)  
Sekretario

Kasisto

Komisiitoj (programo, loĝigado, ekskursoj,  
(informado, kulturaj aferoj, ĵurnalaraj aferoj,...)

Plie estu elektita Revizoro por kontroli la librotenadon, kaj aprobi la finan bilancon.

8) LKK starigas la kongresan programon aprobotande la Estraro de UFE. Projekton de la programo LKK devas liveri plej malfrue 6 monatojn antaŭ la kongreso.

Ordinare, okazas dum la kongreso la jenaj oficialaj aranĝoj:

Inaŭguro

Laborkunsidoj (por la estraro, la konsilio, la jarkunvenoj)

Kunvenoj (por delegitoj de UEA, kaj por respondeculoj de federacioj kaj grupoj)

Varietea Vespero (en teatro)

Eventuale ekzamenoj de F.E.I.

Laŭokaze laborkunsidoj de fakaj kaj aliĝintaj asocioj.

## ADMINISTRADO -

9) La taskoj de L.K.K. estas principe jenaj (laŭ urĝeca ordo):

a) starigo de buĝe propono (minimume 9 monatoj antaŭe),

b) oficiala peto de subvencioj ĉe lokaj kaj departementaj instancoj,

c) rezervado de kongresejo kun taŭgaj aĵoj por estrar-konsili-kaj-jarkunvenoj, kaj por kulturaj aranĝoj,

ĉ) starigi patronkomiteaton (urbestro, pre-

- fekto, parlamentanoj, akademiaj rekto - roj kaj inspektoroj, kaj aliaj eminentuloj)
- d) rezervado de hotelĉambroj
- e) redaktado de aliĝilo kaj komunikoj pri la kongreso por F.E. kaj artikoloj por la gazetaro,
- f) oficiala peto de speciala poŝtmarko aŭ poŝtstampo,
- g) presigo de kongres-libro laŭeble senpaga dank'al reklamado,
- ĝ) ekspozicio kaj vendo de libroj (libroservo de UFE kaj eventuale libroservo de alilandaj asocioj partoprenantaj).

10) La ĝenerala sekretario kun-ordigas la preparajn laborojn k/ provizas la LKKon per konsiloj kaj rekomendoj, kontrolas la aplikon de la regularo. Li povas komisiis membrojn por specialaj taskoj, kaj esti konstante reprezentata de la helpsekretario. Krome, li estas helpata de la estraranoj koncerne la respektivajn fakajn punktojn, (kulturaj aferoj, financaj kaj poŝtaj aferoj kaj ekskursoj).

**FINANCOJ -**

- 11) Surbaze de akceptita buĝetpropono, la estraro fiksas la kongresan kotizon por ĉiu partoprenanto.
- 12) La eventuala monprofito de la kongreso principe estas dividita inter UFE kaj L.K.K. Kiam estas partopreno de alilandaj

asocioj por komuna kongreso, la profito estas dividita laŭ la nombro de alilandaj partoprenantaj asocioj.

Plej malfrue 3 monatojn post la kongreso, LKK. devas sendi al la Estraro de UFE finan bilancon kun raporto de la revizoro.

**KULTURA PROGRAMO -**

13) Por kongreso de lingvaj asocioj la kultura programo konsistigas la kernon de la manifestacio: ĝi estas ellaborita de la LKK kun aprobo de la estrarano pri kulturaj aferoj de UFE. La diversaj eroj estas principe prezentitaj de la regiona esperantistaro; tamen aliaj grupoj aŭ aliaj regionaj elementoj povas esti enŝovitaj kondiĉe ke ili estu aprobitaj en la definitiva programo. La ordon de la teatraj aŭ varieteaj spektakloj prizorgas la estrarano pri kulturaj aferoj aŭ lia reprezentanto.

14) Ekzamenaj sesioj povas esti organizitaj nur se la LKK disponigas konvenan ĉambron, kaj se troviĝas inter la partoprenantoj, ekzamenantoj kvalifitaj de F.E.I.

15) Por ĉiu demando ne-traktita en ĉi tiu Kongresa Regularo validas la statuto de UFE kaj ĝia reglamento. En okazo de dubo aŭ malkonsento koncerne la interpretadon de ĉi tiu regularo, aŭ de esceptaj cirkonstancoj, decidis la Estraro de U.F.E.

-o-o-o-o-

**RECENZOJ**

Rabindranath Tagore -- Kurt Schmidt:  
 -----  
 HINDA RELIGI - FILOZOFIO. Instituto  
 -----  
 Teozofia Uruguay - 1968 - 56 p.  
 -----

En tiu ĉi bedaŭrinde malbone presita libreto troviĝas la teksto de la "Realeco de la Religio, skribita de R. Tagore okaze de la Ramakrishna Centjara celebrado, kaj publikigita

en la Hinda Revuo "Suddha Dharma" en la numeroj aprilo kaj majo 1937.

La granda hinda poeto kaj amanto de l'homoj perolas pri la urgo de la Infinito, evoluo al perfekteco -malkovrante ĉi tie la ĉefajn ideojn de Teilhard de Chardin- kaj la interrilateco de harmonio. La fino de la eseo estas laŭ mi tre bela. Jen ĝi estas:

"Permesu al mi, ke mi finu per malmultaj linioj de la granda mistika poeto de mezepoka Hindujo, Kabir', kiun mi rigardas kiel unu el la plej grandaj spiritalaj geniuloj de nia penso:



MANANI nous a fait connaître un bien sympathique petit pays: le BURUNDI qui faisait autrefois partie du Congo belge. Il nous a parlé des difficultés auxquelles son pays doit faire face, difficultés qui sont celles de tous les états récemment libérés de l'emprise du colonialisme (oppression des classes dirigeantes sur les ethnies les moins développées, pauvreté du pays trop petit pour avoir une organisation rationnelle de l'agriculture et de l'industrie)....

Un grand merci à notre ami pour son intéressant exposé.

-o-o-o-

La Federacia kongreso okazos en Lyon la 19-an de aprilo.

LANGUEDOC-ROUSSILLON - Pluraj grupoj de la federacio akceptis nian japanan amikino F-non Kimie OZAWA: en Perpignan, ŝi faris demonstraciojn de kalkul-aparato por blinduloj ĉe la blindulasocietoj kaj krome partoprenis publikan prelegon organizitan de la Politeknika Asocio.

En ALES la akcepto okazis en kunlaboro kun "L'Amitié des Aveugles de France". F-ino OZAWA restis 10 tagojn en MONTPELLIER, kie dank'al ŝi du tre trafaj artikoloj aperis pri esperanto kaj Japanujo.

NIMES akceptis ŝin dufoje, fine de decembro kaj meze de januaro. La 15-an de januaro ĉiuj regionaj gazetoj aperigis longan artikolon kaj foton pri ŝi.

La Federacia Kongreso okazos en PERPIGNAN la 26-an de aprilo 1970.

NANCY - La grupo efike laboras per la koresponda kurso, kiu havas 23 gelernantojn. Krome la grupo dissendas multnombrajn artikolojn al la loka gazetaro, kiu aperigas la plimulton de ili.

N I C E - La tieaj samideanoj kaptis la okazon de la "Festo de

la Tri Reĝoj por kunveni en Hotelo Noailles, la 25-an de januaro.

PARIS - La 31-an de januaro, en la granda Amfiteatro de la Naturohistoria muzeo, en ĉeesto de 250 personoj, S-ro Jossinet, prezidanto de la grupo, antaŭ ol paroladi pri la Origino de la loknomoj en "Ile-de-France", skize atentis la valoron de Esperanto por la personoj rilatoj kaj la kulturaj interŝanĝoj.

ROUBAIX - S-ro HANNEY (Aŭstralio), partoprenis kunvenon de la loka grupo kaj respondis al multaj demandoj pri sia naskiĝlando.

TOULOUSE - Kun plezuro ni eksciis ke D-ro ALBAULT, prezidanto de U. F. E. estas nun Kavaliro en la Ordeno de "Palmas Académiques" pro servoj al la Nacia Edukado.

Ni petas lin akcepti la sincerajn gratulojn de la membroj de la Asocio

VALENCE D'AGEN - La ekspozicio "Le Livre Esperanto" okazis tie de la 24/1 ĝis la 27/1. La inauguron dek-kvin personoj ĉeestis; inter ili la du geestroj de la knabina kaj knaba lernejoj. Antaŭ la parolado, ili atente rigardis la librojn, kaj interesiĝis pri la 20 albumoj de "Grājnoj en Vento"; efektive la geknaboj el Valence fidele partoprenas, ekde la jaro 1962 tiun internacian lernejan rondon.

En sia parolado D-ro Albault konstatis la neblon por ni scii la 15 lingvojn plej konatajn, inter la duaŭ tri mil aliaj nun parolataj sur la terglobo. Esperanto tute taŭgas por la nuna homaro. Li memorigas al ni kiel D-ro Zamenhof ekpensis pri lingvo, celante la Pacon. Nun efektiviĝas lia espero: praktikigi vivantan lingvon universalan. Milionoj de personoj parolas nun Esperanton.

Ili venas el ĉiuj horizontoj por renkontiĝi dum la jaraj kongresoj internaciaj. Regas la lingvon akademio de kompetentuloj, kiuj atente

(daŭrigo sur p.40a)

Du aliaj kajeroj prezentas la "kajeron" realigitan en 1966 por soleni la dekan datrevenon de la GEV-rondoj; ĝi konsistas el verkoj de lernantoj el 21 landoj sur 4 kontinentoj. En la antaŭparolo, ERBETTA inventarias la atingiĝojn. Tiam, la reto konsistas el 50 kunlaborantaj lernejoj; aperis 145 numeroj de la gazeto, (ĉiu po 25 eksempleroj). La celo fariĝas "Kulturaj interŝanĝoj inter infanoj, Kontribuado de infanoj per komuna verko paca kaj tutmonda, Esperanto en la lernejoj".

Sube sur tabloj, elmontre kuŝas la paĝoj de tiu escepta numero, kune kun pluraj ekzempleroj de la gazeto.

C - VOJAĜOJ - Elmetitaj sur tabloj, apud skribraportoj, tri grandaj albumoj de memorfotaĵoj. Iliaj titoloj "Vojaĝo en Nederlando 1962" "Vojaĝo al Jugoslavio, 1963", "Vojaĝo al Hungario 1966" frapas la atenton. La supra tabulo sciigas ke, iam, la "Kultura Esperanto-Societo grenobla" instruis esperanton samtempe en C.E.T. Guynemer, en ambaŭ instruistoseminarioj kaj en Laborborso. Por varbi lernontojn, kaj motivi la lernadon de la Internacia Lingvo K.E.S.O.G. proponis, kaj organizis vojaĝojn en fremdlingvaj landoj, sed en esperantistajn mediojn. Tio signifas ke, sur ĉiu haltejo, la franca grupo estis akceptita de lokaj esperantistoj, kiuj surloke estis organizintaj la akcepton, la gastigadon, la vizitojn al vidindaĵoj, por pruvi ke Esperanto estas vere viva ta kaj praktika lingvo, ke ĉie troviĝas Esperantistoj, ĉiujare le vizititaj landoj estis aliaj.

D - ESPERANTO - Plej malsupre kaj maldekstre de la ekspozicio, tabulo reliefigas du opiniojn. Tiun de S-ro Guy HERAUD, profesoro en Fakultato de Strasburgo (vidu AFEn°257,) "Esperanto havas du rimarkindajn ecojn ĝia facileco...ĝia neŭtraleco. Oportuna interpretilo, perfekte adaptita al praktikaj bezonoj...lingvo utiligebla en ĉiuj cirkonstancoj..." kaj tiun de S-ro M. GENEVOIX el la Franca Akademio "Esperanto kapablas es-

primi la plej subtilajn nuancojn de la penso kaj de la sento".

Por pravigi la ĉi-suprajn asertojn specimenaro el la plej diversaj libroj, revuoj gazetoj, turismaj kaj komercaj prospektoj, kovras longan tablon. Inter la libroj, troviĝas ĉiuj literaturaj specoj (romano, poezio, teatro, k. a.) ankaŭ traktaĵoj pri filozofio, politiko, historio, geografio, sciencaj kaj teknikaj verkoj, libroj por infanoj). Sama diverseco en la periodaj gazetoj tapiŝantaj vertikalan tabulegon. El ili, grandnombraj estas bultenoj de asocioj ĉu landaj, ĉu profesiaj, ĉu ideologiaj.

Dekstre, plej supre kaj simetrie, alia tabulo resumas la atingiĝojn de la esperantistaro per cifera tabulo. Oni legas:

- 10.000 literaturaj verkoj
- 3.600 delegitoj en 57 landoj
- 1.200 societoj aŭ grupoj, ktp.....

Sube, sur izolita tablo, afiŝeto atentigas pri "gravega libro por Esperantistoj: la "JARLIBRO". Fakte inter multaj aliaj informoj, en ĝi oni trovas la titolojn kaj prezojn de pli ol 1.600 libroj aĉeteblaj en libro-servo, la adresojn de la delegitoj kaj de diversaj fakoj, societoj, asocioj. Dank' al la jarlibro, Esperantisto povas organizi vojaĝon (kiel KESOG) trovi korespondantojn, akiri deziratan informon...

Aparto loko estas rezervita al "Esperanto en Edukado". Tie, oni vidas pedagogian revuon, bultenojn de edukistasocioj, statistikojn pri esperanto-instruado en lernejoj, raportojn pri eksperimentoj rilata la pedagogian valoron de E°, k.a., broŝurojn: "L'Esperanto dans l'Enseignement" (Denoël), lernolibrojn, vortarojn, ktp...

D - KIEL LERNI ESPERANTON - Anoncas tabulo pendanta ĉe perpendiculara muro: ĝi konsilas:

- 1) la publikan kurson en la urbo, kiam ĝi ekzistas;
- 2) se ne, unuope hejme (a) per koresponda kurso (b) per lernolibro kun - aŭ sen - diskoj. En ambaŭ okazoj sin turni al G.E.E. al U.F.E. aŭ al SAT-Amikaro.
- 3) dum la somera libertempo en Kastelo Grésillon en Baugé.



E - ALVOKO - La ekspozicio finiĝas per al-  
vokoj: EDUKISTOJ, fariĝu Esperantistoj  
instruu Esperanton al la  
infanoj

ESPERANTO-LERNADO ebligas plifunde esplori  
la francan lingvon  
faciligas la akiron de ali-  
aj lingvoj

Ĉu ne estas ankaŭ pliaj motivoj por lerni  
la Universalan Lingvon? Ĉu ne malsaĝa la  
homo, kiu entreprenas interplanedajn voja-  
ĝojn dum sufiĉas al li iri nur kelkajn cen-  
tojn da kilometroj por troviĝi antaŭ land-  
limo transe de kiu li sentos sin tute frem-  
da inter aliaj teranoj? La subskribinto re-  
vas pri mondo, kie Esperanto estos instrua-  
ta en la unuagrada lernejoj de ĉiuj lan-  
doj samtempe kun la nacia lingvo. Kia avan-  
taĝo por ĉiuj, ĉefe por la laboristo devig-  
ata migri por akiri siajn vivrimedojn, por  
la junulo deziranta ekkoni la mondon!

Onidire, edukisto devas formi la eston-  
tan homon; sed ĉu morgaŭ ankoraŭ estos ho-  
moj? Eminentuloj, kiel EINSTEIN, REVES, RUS-  
SEL, de CHARDIN, KASTLER kaj multaj aliaj,  
avertis nin: kompleta detruo minacas la ho-  
maron, tiel longe ĝi ne estos realiginta  
sian konstitucian unuacon (mondregistaro,  
ĝenerala senarmigo, supernaciaj organiza-  
ĵoj). Nu, komuna lingvo estus potenca unui-  
gilo!

Kial ne aprobi la lastan tabulon, kiu di-  
ras:

"Niaj antaŭuloj kreis la familian konscion,  
"poste la civitan konscion.

"Niavice, ni formu la homaran konscion".

Tiacele, ni lernu, ni instruu la Univer-  
salan Lingvon ESPERANTO.

GRANIER

=====

BAGHY en la Franca!

=====

Nedubeble ekzistas kelkaj libroj  
en Esperanto, kiuj meritis esti le-  
gataj de tre vasta publiko, ankaŭ  
aŭtoroj, kiuj pravigus ke "oni" ler-  
nu nian lingvon por konatiĝi kun  
ili. Almenaŭ plurfoje mi renkontis  
tiajn kaj similajn asertojn. Ja pre-  
ve! Sed la vasta publiko tion ne  
scias; por ke li eksciis estas nur  
unu rimedo, nome ke oni prezentu  
tiajn aŭtorojn pere de bonaj tradu-  
koj. Kaj tiaj entreprenoj devas esti  
almenaŭ morale subtenataj, por ne  
diri pli. Minimumo devus esti infor-  
mo al niaj membroj.

Nu! okaze de la kampanjo de eks-  
pozicioj pri la Esperanta libro, kiun  
la Sud-Franca-Pirenea Federacio or-  
ganizis, dank'al la tiel bone prepa-  
rita kaj ekipita materialo de S-ro  
Lentaigne, mi havis la avantaĝon es-  
ti invitita de la loka societo en  
Valence d'Agen. Kaj tie, meze de  
multaj libroj aldonitaj de Ges-roj  
Debande, supozeble mi a instinkto  
kondukis min al ordinare prezentita  
libro; ondo de miro kaj ĝojo kaptis  
min! Temis pri Baghy en la Franca!  
Jen mi havis sub la manoj "Le Prin-  
temps en Automne", kiun mi ĝis tiam  
konis nur el la originalo. Mi febre  
foliumis, kaj elpikis legis kelkajn  
paragrafojn jen tie, jen tie ĉi: la  
traduko ŝajnis al mi tute glata, per-  
fekta, inda de nia granda aŭtoro.

Vere mi diras grandan dankon al  
la tradukintino, S-ino Irène Marsy,  
pli konata en nia S.F.P.-Federacio  
kiel iama aktivulino sub la nomo de  
F-ino Irène Dancausse!

Ĉi artikoleto ja ne anstataŭigas  
recenzon. Ĝi estas nur la esprimo de  
mia miro, ke en nia revuo, kiun mi  
trarigardis ĝis fino de 1964, ja ne  
aperis recenzo. Nepardoninda manko.  
Se S-ino Marsy legos tiujn liniojn,  
ŝi sciu, ke mi tre alte taksas ŝian  
laboron; mi volus esperi, ke aliaj  
sekvu ŝin per similaj entreprenoj, ke  
ankaŭ ŝi plu traduku! Tio estas vojo  
ĝis nun ne sufiĉe uzata, tra kiu ni  
povus diskonigi nian lingvon al  
vasta eble ĝis nun ne tre tuŝita  
publiko.

Por eventuala bezono, jen la bi-  
bliografiaj detaloj, kiuj samtempe  
memorigos vin pri nia nacia Kongre-  
so en Monako (Pentekosto 1970):

Julio Baghy - Le Printemps en  
Automne - Trad. de l'Espéranto  
par Irène Marsy - Edit. Regain  
Monte-Carlo 1961 - 126 p.

Lingvo povas venki nur per la  
kulturo, kiun ĝi povas disradiigi  
ĉirkaŭ si! La traduko estas unu el  
la rimedoj, per kiuj ĝi povas koni-  
gi sian disradiadon!

D-ro A. ALBAULT





Sous le titre " l'Espéranto connaît une vogue croissante dans le Gard " dans le "Méridional" du 20/2, Garnier Montfort dresse le bilan de l'activité de la Fédération Espéranto du Gard à laquelle sont rattachés les groupes d'Alès, Nîmes et Vergèze. Nous sommes heureux de féliciter nos amis VOLPE-LIERE et RAYNAUD pour leur action inlassable et formulons l'espoir que ces groupes viendront grossir les rangs de notre U. F. E.

Nous formulons les mêmes souhaits à l'occasion de la naissance du "Cercle d'Etudes Espérantistes de l'Ariège" à Foix (J.O. du 12 mars 1970).

Dans un article intitulé "BABEL", signé par B. BONNISSENT et paru dans plusieurs hebdomadaires de province, dont le "Courrier du Loiret" du 14.2.1970, celui-ci écrit notamment:

Les hommes de nos jours ont trouvé (ou retrouvé?) le moyen de se hisser jusqu'au ciel grâce à des fusées propulsées à partir de tours qui ne sont plus de Babel mais de lancement (à moins que la tour de Babel ait été aussi - et certains sont de cet avis - une tour de lancement d'un genre analogue).

Quoiqu'il en soit, même à l'époque des voyages sur la Lune, la confusion des langues subsiste.

Et avec elle subsistent également toutes les conditions de conflit que suscite l'incompréhension entre les hommes.

Pour fraterniser, et tout simplement pour s'entendre, il faut un langage commun qui permette de communiquer.

C'est aussi une condition essentielle de l'information et des échanges scientifiques, techniques, culturels entre les peuples, pour le progrès des uns et des autres.

.....Longtemps dans l'enseignement, c'est l'enrichissement culturel et littéraire des langues étrangères qui a prévalu. Mais nous sommes désormais à l'époque des sciences et des techniques et le côté utilitaire des langues étrangères l'emporte désormais.

En France, notre enseignement en est encore à l'étude culturelle et littéraire des langues étrangères et il s'ensuit une inadaptation fla-

grante qui provoque une nouvelle crise dans un domaine où les crises ne se comptent plus, et de toutes sortes. Nous enseignons encore dans nos établissements scolaires les langues vivantes comme des langues mortes. Si bien qu'après avoir étudié pendant sept ans une langue étrangère au collège et au lycée, le bachelier moyen demeure la plupart du temps, si pratiquement ignorant de cette langue qu'il est incapable de la comprendre et de la parler dans une conversation courante.

Que dire d'un système d'enseignement qui donne d'aussi piètres résultats sinon qu'il se concerne lui-même. Or, une nouvelle querelle et une nouvelle vague de protestation vient de s'élever dans l'enseignement à la suite d'une circulaire du Ministre qui rend facultatif et non plus obligatoire, l'enseignement d'une deuxième langue vivante à partir de la quatrième.

Et comme toujours ce sont les plus mauvais arguments qui sont mis en avant. Tel celui qui consiste à appuyer cette protestation sur le fait que cette mesure risque de diminuer le recrutement des professeurs de langues étrangères.

A coup sûr; mais considérer l'enseignement d'abord comme une machinerie destinée à créer des emplois c'est le détourner de sa mission première et essentielle. Et l'enseignement des langues étrangères aussi.



programo.  
Kun la espero renkonti Vin en Mari-  
bor, kore salutas vin

Gaston TURIN  
=====

(NDLR): ĉu la oficialej instancoj de  
G.E.E. anoncis al la prezidanto de  
L.K.K. sian deziron organizi tian  
renkonton?

=====  
OOOXXOOOXXOOOXXOOOXXOOOXXOOOXXOOOXXO

KURSGVIDANTOJ...

ĉu vi faris ĉion eblan  
por via LANDA ASOCIO?

ĉu vi membrigis viajn  
gelernantojn al U.F.E. ?

Se ne, senhezite proponu al ili  
SOLIDARECAN ALIĜON

ELENA KOTIZO 30 F (2,50 po monate)  
SIMBOLA KOTIZO: 6 F (0,50 po monate)

---!---!---!---!---!---!---!---!---!---

VIVO DE LA GRUPOJ (daŭrigo de p.31a)

defendas la unuecon de la lingvo en  
la tuta mondo.

Poste, la parolanto respondis al  
demandoj prezentitaj. Li precizigas,  
ke Esperanto unue elkreskis el Fran-  
cujo, sed se nun ĝi stagnas ĉi tie,  
ĝi disvolviĝas tra la mondo. Eĉ la  
orientaj landoj, Ĉinio kaj Japanujo,  
volonte ĝin lernas.

Dum la tri sekventaj tagoj tridek  
personoj vizitis la libraron. Ankaŭ  
venis dudeko da gelernantoj akompa-  
nataj de sia instruistino; patrino  
venis kun deko da junaj emikoj de  
sia filo. Ili starigis enketon pri  
la ekspozicio kaj la rezulto estos  
videbla en proksima "Grajnoj en vento"

---XX---XX---XX---XX---XX---XX---XX---XX---XX---

Le Gérant: BOURDEAUX  
CPPP N°21755  
SITEC Impr.188 Fbg St Denis PARIS X°

La plej multo kunportis informojn k.  
propagandilojn. T r i instruistinoj  
intencas ĝin lerni; unu el ili ko-  
mencis la studadon la 2/2.

En Castelsarrasin, nur tri perso-  
noj venis nin viziti dum ĵaŭdo 29/1.  
Unu el ili, lernejestro de la urbo,  
aĉetis du librojn kaj abonis la re-  
vuon "Kulturaj Kajeroj". Alie perso-  
no, junulgastejestro de la urbo,  
prenis dokumentojn kaj afiŝojn por  
la junulgastejo.

Konklude, ni povis konstati ke la  
ekspozicio pli efikis en Valence mem-  
ĉar tie Esperanto jam de pli longe  
estas konata kaj la personaj rilatoj  
ne estas neglekteblaj!

S-ino Debande.

=====  
OOOXXOOOXXOOOXXOOOXXOOOXXOOOXXOOOXXO

KARAVANO AL VIENO  
=====

Okaze de la 55-a Universala Kongreso  
ni povas proponi al kongresantoj:

1) Paris-Vienon-Parizon per aviadi-  
lo, duonpensionan restadon dum la  
kongresa semajno, semajnfino (2 nok-  
tojn) en Prago, kvintaga veturado tra  
la alpa regiono de Aŭstrujo (Graz,  
Klagenfurt, Grosskloekner, Zell-am-  
See, Vieno) kun plena pensio (pas-  
porto kaj vizo por iri al Prago):  
Prezo: 1565 F.

2) Paris-Vienon-Parizon per aviadi-  
lo, duonpensionan restadon dum la  
kongresa semajno Prezo: 945 F.

Minimuma partopreno: 15 personoj en  
ĉiu propono - Enskribiĝo kun tuja pa-  
go de 300 F.

XX  
La 23-an de marto, F-ino Annie BARGEOT  
kaj Michel BERNARD geedziĝis.  
Korajn bondezirojn al la nova paro.

---XX---XX---XX---XX---XX---XX---XX---XX---XX---

Bulgara instruisto pri franca lingvo  
deziras kontakton kun gefrancoj pere  
de E°.DIMITROV 15 Karaĝa KUBRAT (Bu)